

John Ellerton,
Finiĝas nun alia tago

tradukita de William John Downes

1. Finiĝas nun alia tago,
jam venis la vespera hor'.
Kunvenis ni por adorago
plaĉanta al la Di-Sinjor'

2. Ni dankas Vin, Savanto nia,
ke sur la tuta mond-teren'
la sankta eklezio Via
staradas firme ĉe posten'.

3. Ruliĝas tero, brilas lumo
de ne-ĉesanta maten-glor'.
Leviĝas laŭdo, preĝ-parfumo
konstante, kiel dolĉ-odor'.

4. Ekdormas ni post sun-subiro;
gefratoj en la okcident'
vekiĝas kun novtag-aspiro
Vin glori per viv-elokvent'.

5. Formortos mondaj imperioj,
sed Via regno kreskos plu.
Al Vi sin cedos dinastioj,
Venkinto estos vi, Jesu'!

...

John Ellerton,
Ni estis ja en mano Dia

tradukita de Manfredo Ratislavo

1. Ni estis ja en mano Dia,
dum brilis super ni la Sun'.
Protektu nin per mano Via
dumnokte, Dio, ankaŭ nun!

2. La ter' cirkulas ĝis la veno
de l' nova tag', ripozas ni
dum tiu nokt' en Via beno²
ĝis la mateno, kara Di'.

3. Nun kiam en malhel' fordronas
la Sun' en tiu ĉi vesper',
multvoĉe Via laŭdo sonas
alialoke sur la Ter'.

4. Ĉar kiel estas ĉirkaŭanta
la Teron lumo de l' maten',
senĉese estas plusonanta
preĝado de la homoj jen.

5. Ja estas, Dio ĉiopova,
senlima Via regno, nin
konduku al la tago nova
en Via regno je la fin'!

...

John Ellerton,
Du lässt den Tag, o Gott,
nun enden

tradukita de Raymund Weber

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

John Ellerton,
Forpasis tiu tag', Sinjoro

tradukita de Frieder Weigold

1. Forpasis tiu tag', Sinjoro,
Kaj profundigās la senlum'.
Vi gardis nin de ajn doloro.
Nin gardu ankaŭ dum noktum'!

2. Ni rotacias en la tagon.
En nokta paco dormas ni.
Kaj portas lumon trans la maro
La suno, kie brilas ĝi.

3. Senĉese kiel la mateno
Briladas super tera rond',
Eksonas laŭdo pro la beno
Al ĉiu sur la vasta mond'.

4. La suno, kiu ĵus subiris,
Ja brilas en plu fora land'!
La gloron, kiun ni admiris,
Anoncas plu preĝada kant'.

5. Pereas regnoj. Tiel estu!
Kaj sole staras via tron',
Ke sole via regno restu
Je fina tag' sub unu kron'.

...

²aŭ: dankante Vin pro Via beno, Vin adorante, kara Di'.

*Traduko de la Angla poemo “The day Thou gavest, Lord, is ended” de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de WILLIAM JOHN DOWNES (*1892 – †1987).*

Arg-130-302 (2004-02-04 11:38:05)

*Tiu ĉi traduko aperis en la Eku-
mena Diserva Libro “Adoru”, eldo-
nita en 2001 de Internacia Katoli-
ka Unuiĝo Esperantista (IKUE) kaj
Kristana Esperanta Esperanto-Ligo
(KELI), kanto numero 153.*

*Traduko de la Angla poemo “The day Thou gavest, Lord, is ended” de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2004-01-10.*

Arg-130-257 (2008-11-08 00:42:46)

*Traduko de la Angla poemo “The day Thou gavest, Lord, is ended” de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 – †1893-06-15) en la Germanan de Raymund Weber.*

Arg-130-256 (2008-11-08 15:30:25)

*Diese Übertragung ins Deutsche ist abge-
druckt in dem Gesangbuch der Katholischen
Kirche in Deutschland “Gotteslob”, in der
neueren Ausgabe. Der Text mit den Muzikno-
ten findet sich auch auf der Heimseite http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf.*

*Traduko de la Angla poemo “The day Thou gavest, Lord, is ended” de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de Frieder Weigold.*

Arg-130-932 (2008-11-08 14:22:49)

*Mi, Manfred Retzlaff, ricevis tiun
ĉi tradukon de la kanto en 2008-
11-06 de sinjoro Frieder Weigold
(Birkenstr. 12, D-82178 Puchheim,
Germanio), kiu mem faris la tra-
dukon en Esperanto. S-ano Weigold
verkis tiun tradukon - kiel li diris
al mi - laŭ la germanigo farita de
s-ro Raymund Weber. Tiu germanigo
estas trovebla en la germana katolika
kant-libro “Gotteslob” (= Laŭdo de
Dio), n-ro 981, pli nova eldono. La
teksto kun la muzik-notoj troveblas
ankaŭ en la retejo http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf.*